

August Heinrich Hoffmann,

August Heinrich Hoffmann,

August Heinrich Hoffmann,

Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Abendlied

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo*

Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Surkampare iĝas
ree nun vesper',
milde subeniĝas
paco de l' eter'.

Nun vesper' fariĝas
Ree tie ĉi,
Paco subeniĝas
Kaj ripozas ni.

Ree vesperiĝas
ĉie en la rond',
paco subeniĝas
kaj ripozas mond'.

Nur de l' roko bruas
rivereta flu',
kaj la akvo fluas
ĉiam ĉiam plu.

Rivereto fluas
Ĉe la roko sen
Ĉeso kaj ĝi bruas
Plu kaj plue jen.

Riveret' nur fluas
ĉe la roko jen,
kaj ĝi daŭre bruas
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne haltigas iu
ĝin je l' tagofin',
kaj vesper' neni
ripozigas ĝin.

Sonoril' neni
Ripozigas ĝin,
Ne dormigas iu
Ĝin je l' tagofin'.

Ne vespero iu
endormigas ĝin,
sonoril' neni
je la tago-fin'.

Mia kor', senlace
strebas ankaŭ vi,
vi ripozos pace,
nur se volos Di'.

Tia, mia koro,
Estas ankaŭ vi.
Donu, ho Sinjoro,
Pacon vi al ĝi.

Mia koro, tia
estas ankaŭ vi!
Pacon trovos mia
koro nur en Di'.

...

...

...

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1988-04-16.

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich.

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff*, *Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde*, Germanio, *1938-11-04) en 2012-11.

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html, la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (*Hoffmann von Fallersleben*, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-01-27.

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.